# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

PLENUMITA 02/12/2021 Kvincentkvindeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*


**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 805,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **286,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **221,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **191,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde aprilo 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



**Esperanta Retradio** Mortanta belulino

**26/11/2021**




*Marcelnaskiĝis 4-an de Decembro1917*







# Feliĉan Naskiĝtagan Datrevenon je 4a Decembro.




## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 4a de decembro estos la unua sabato. Venu! *Roger Springer*

Celebru ***Thanksgiving Day*** usonan dankotagon


En la komencaj paĝoj de *A People's History of the United States de Howard Zinn,* ni legas la protokolon de **Kristoforo Kolumbo**, kiu rakontas la unuan renkontiĝon de eŭropanoj kun la indiĝenaj Aravakoj de Bahamoj: Ili ne portas armilojn, kaj ne konas ilin, ĉar mi montris al ili glavon, ili prenis ĝin kaj eltranĉis sin el nescio... *Roger Springer*

**"Kun kvindek viroj ni povus subigi ilin ĉiujn kaj igi ilin fari kion ajn ni volas."**

## Mondo Feliĉiĝu. La Eŭropanoj venis/as/os

*Roger Springer*





# Kial Aŭstralio ree sendas soldatojn al fremda lando por militi ?



Ĉu kontraŭ la protestantoj kiuj detruas ĉinajn butikojn?
Ĉu kontraŭ la popoloj, kiuj deziras amikiĝi kun Ĉinujo?
Ĉu por helpi la Usonan konfikton kontraŭ Ĉinujo?
Ree Aŭstralianoj mortos en alies milito. Kial?

**Mi komprenas la eblecon kiel;**

**Sen konsulto, La Ĉefministro de Aŭstralio mem rajtas fari militon.**

Hontinda afero. http://www.warpowersreform.org.au/ *Roger Springer*

## Aŭstralio nutris tumultojn en Salomono:

Australia has fomented riots in Solomon Island: Global Times editorial - Global Times

**Kontraŭ milito.** Laŭ mi, ĉi foje, la plej grava voĉdona promeso de la politikistoj por gajni vian voĉdonon estas ne plua partopreno en fremdaj militoj.

**Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.**

*Australian Citizens Party* *View Email in Browser (enudgemail.com.au)*
*The Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn.
*Green Party* Eble? sed ili ne tiel klare esprimas sian kontraŭon *Roger Springer*

## Demando de Marcel en AE558.

Mi konsentas kun viaj kredoj pri la ĉina raso. Multaj de Ili sentas ke la ĉina nacio estas ne la lando Ĉinujo sed la ĉina popolo.
Mi loĝis en Ĉinujo dum unu jaro kaj trovis ke mia komprenaĵo pri la ĉinoj tute eraras kaj mi komprenas kial ili fieras pri sia raso kaj ĉinujo. Respondo de *Roger Springer*

## Aliaj respondoj al la demandoj de Terry Manley AE557




T: **KIOM DA HOMOJ LA MONDO SUBTENUS?** Terry Manley
R: Malpli ol ni nun havas. Sed sufiĉe por apogi la idealan tutan popolon.
T: Ĉu ĉiuj el tiuj havus la saman materialisman vivstilon kiel ni en Aŭstralio kaj aliaj riĉaj landoj?
R: Ne. La forĵetu vivstilo uzas multege da materialo. Kion vi bezonas kontraŭ kion vi deziras detruos la planedon kaj la homaron
T: El kie ni trovus tiom da materialoj? Ĉu Antarktio? Pro protektado, Ĉu la luno aŭ marso?
R: La materialo estas limigita aŭ tro multkosta
T: Ĉu teknologio solvos ĉiajn problemojn, kiel, nia ĉefministro kredas?
R: Poltikistoj nur zorgas pri la venonta voĉdonado.
T: Roger skribis en sia artikolo *'La mondo nun ne havas tro multajn homajn problemojn,"* Do eble ni ne bezonas teknologiajn solvojn ĉar ni ne havas problemojn?
R: Jes, Jes, Jes. Mi kredas ke tro multe da homoj rezultis/as/os en mondproblemoj.

**Seksumu sed ne havu tro da idoj** helpos la mondo subteni ĉiujn vivaĵojn.

*Roger Springer*

# La homaro, en la lito, solvas la mondan plej grandan problemon.

The baby bust: How a declining birth rate will reshape the world - New Statesman




Komprenu ke ĉar virinoj povas nun mem elekti havi infanojn aŭ ne, dek naskiĝpovaj virinoj devas naski 21 infanojn por ne malpliigi la nombron da homoj en la mondo. Familioj nun elektas 1 aŭ 2 aŭ neniun infanon.

Antaŭe farmistoj bezonis multajn infanojn por helpi prizorgi la plantojn, bestojn, ktp por la vivo kaj ankaŭ zorgi la gepatrojn kiam ili maljuniĝos.

Urbanoj ne monprofitas per naski infanojn. La kosto por la subteno de ĉiu infano estas grandega. *Roger Springer*

Kiam la monda popolo duoniĝos, la valoro de la restantaj homoj pligrandiĝos kaj la necesaj laboroj nur estos konservanta laboro. Sed ni devos havi ian universalan pagon por subteni la tre valorajn homojn. La homaro estos kapabla solvi aliajn problemojn.

*Ni invitas Esperantistojn en Melburno al la "Zamenhofa Festo"*

*6.30 ptm, Sabaton la 11an de Decembro 2021*

*ĉe la "Radisson on Flagstaff Gardens Hotel"*

*380 William Street, Melbourne.*

*Ĝuu vesperon de muziko, kantoj, paroladoj, kaj aliaj distraĵoj*


*Ni provizos leĝeran vespermanĝon*

*Ni esperas ke vi celebros kun ni.*

*Heather Heldzingen*



Mondfama aŭstralia indiĝena aktoro mortis pro pulma kancero je la aĝo de 68 *David dalaithngn* aktoris en *Crocodile Dundee* kaj multaj aliaj filmoj
https://www.abc.net.au/news/2021-11-30/aboriginal-actor-yolngu-david-dalaithngu-crocodile-dundee-dies/8468524



Tiuj, kiuj vidis la filmon "Ŝtormido" *(Storm Boy),* kun subtitoloj tradukitaj de Trevor Steele, bone memoros la lertecon kaj belon de la aktoro David Dalaithngu.

*Margaret Furness*, Adelajdo

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

# La estonto de la homaro. *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

**NE KREU GEFILOJN!**

Mi konsilas al ĉiuj homoj ne plu krei gefilojn. La ialo estas, ke la estonto, eble baldaŭ, de la homaro estos tre malbona, tro malbona por normale vivi. Tio precipe estos la rezulto de du tre malbonaj nunaj situacioj, unue ke la kapitalisma ekonomio sin mem tendencas ruinigi, kaj due ke la nuna generacio estas malpli inteligenta ol la antaŭaj ĉar la teĥnologio transprenis la pensadon de la plej multaj homoj. Pro tiu manko de inteligento la homoj kredas la neeblan sensencaĵon ke "Ni devas kunvivi kun la viruso". La homaro AŬ sin komplete senigas sin de la viruso, AŬ la viruso kapablos detrui nin, tiom kiom eblas per daŭra mutaciado al pli fortaj variaĵoj grandskale mortigante nin ĉiutage.

Por kompreni la estantecon kaj antaŭvidi la estontecon oni devas ankaŭ studi la pasintecon. En tiu pasinteco, post la dua mondmilito, Aŭstralio estis demokrata lando, kun forta parlamento, kaj plu estas tia. Tiom, ke ni neniam pensus aŭ kredus ke ĝi fariĝos diktatoreco kiel en la Hitlera Germanujo. Se iu dirus al ni, ke eble baldaŭ Viktorio aŭ Aŭstralio estos diktatoreco kia sub Hitler, ĉiuj aŭstralianoj ridus kaj dirus ke nia demokrateco estis tro forta ĝis nun por ke tre malgranda aŭstralia nazi-partio sukcesu en nia parlamento kun fortaj demokrataj partioj. Neniu aŭstraliano eĉ pensus pri tio, kaj nur ridus se vi antaŭvidus tiun diktaturon. Neniel eblos, ili ride respondus.

Mi memoras la tempon en Germanujo antaŭ la apero de Hitler. Germanujo estis forta demokratio, kun tre forta Laborpartio kaj kelkaj sufiĉe fortaj dekstraj partioj, kaj nur tre malgranda nazi-partio, tro eta por timigi la germanojn. Same kiel en Aŭstralio nun. Kaj same, neniu germano tiutempa kredus tian "sensencaĵon". Neniu! Germanujo havis tiom da kulturo kaj politika libereco ke diktatoro havus neniun ŝancon. Kiel nun en Aŭstralio. Sed kun la helpo de Hitler kaj Goebbels kaj Goering, kaj precipe per mensogado kaj per timigado kaj per eltrovado de tiuj, kiuj voĉdonis kontraŭ la nazia partio, ili sukcesis gajni la elektojn. Samtempe ili enkarcerigis aŭ forĉesis la aktivajn laborpartianojn, mortigis la komunistojn, kaj konvinkis multajn konservativulojn ke Naziismo estas pli bona ol socialismo. Kaj kun la silenta aprobo de la germanaj feroindustriistoj.

Antaŭ Hitler neniu germano kredis ke baldaŭ ili havos diktaturon, same kiel nun en Aŭstralio oni neniam kredas ricevi diktatoron kune kun potenco de la eta nazi-partio. Usono nek Ĉinujo povos malhelpi tion.

Ankaŭ tiuj ebleco kaj verŝajneco igas min konsili ne krei pli da homoj: La homaro per militoj detruos sin mem aŭ lasos la virusojn detrui nin. Kaj intertempe nia planedo ruiniĝos pro la manko de arbaroj, de aero, de akvo, kaj de nutraĵoj.



*Marcel Leereveld*.

# Marcel kaj *The Age*, la fama Melburna ĵurnalo

Mi skribis al la fama Melburna ĵurnalo *The Age* pri Marcel Leereveld kiu estos 104 jara post nur kelkaj tagoj kaj ankoraŭ tre aktivas en Esperantujo. Jen la artikolo.
https://www.theage.com.au/national/victoria/use-your-brain-103-year-old-radio-host-still-going-strong-20211126-p59cjl.html



Amike, *Nicole Else*

# Kial la Militaro ricevas Senpagan Enirpermesilon por Polui?

Webinar: Kial la Militaro ricevas Senpagan Enirpermesilon por Polui? - World Beyond War . . .

**Ne eblas Verda milito!** Fighter Jets Are For Climate Losers *Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 63 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La kernvorto de la gramatika subjekto ricevas la nominativon kaj de la objekto ĝi ricevas la akuzativon. En kiu, neuzinda, kazo ĝi ricevas nur la nominativon?

2). Kompletigu: "La kernvorto de la adjekto estas AŬ ........ AŬ .......... ".

3). Kiom da subjektoj kaj da objektoj kaj da adjektoj povas troviĝi en unu propozicio (= frazo)?

4). Kiel oni gramatike nomas la lastan vorton en "Pri tio ni ne estas certaj".

5). Donu ekzemplon kun du prepozicioj antaŭ la substantivo.

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 559. *Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** 1) La administrantoj de la radio 3ZZZ kontaktis ĵurnaliston por disvastigi la novaĵon ke Marcel 104 jara venontan sabaton, ankoraŭ regule deĵoras en la Esperanto radio programo. Do hodiaŭ la 30an de novembro aperis en " The age" artikolo pri Marcel . Gratulon al li kaj dankon al la ĵurnalisto. Mi ne certas ĉu eblas ĝin legi rete , se vi ne estas abonanto.

2- En la elsendo de la 29a de novembro Heather anoncas la rete aŭskulteblan koncerton organizitan de UEA. Eblas ankaŭ malkovri la regionon nomitan Okcitanio kaj lerni pri la efiko de muziko al frunaskitoj .

Amike, Franciska Informas *Franciska Toubale*

Usono malpermesas al Afganujo uzi afganan monon, 9.5 miliardojn, en la Afgana Centra Banko. *Roger Springer*

US is at the root of Afghanistan's systemic crisis - Global Times




## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ: *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



Kiam ĝi estas adverbo (ekz. "Ni havas multe da misherboj/").

1) AŬ adverbo AŬ prepozicio (prepozitivo).
2) Nur unu subjekton kaj nur unu objekton
3) kaj plurajn adjektojn.
4) Propozitivo.
5) "Ni aŭtis ĝis en la urbo".

*Marcel Leereveld.*



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917